

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Luiza Carol

Kingslim Gadoufia Edah

Maria Galizzi

Mireille Grosjean

Hu Guozhu

Ilona Koutny

Stefan MacGill

Maria Majerczak

József Németh

Radojica Petrović

Klaus Santozki

Bardhyl Selimi



ilei

50-a Kongreso de ILEI
15 julio - 22 julio 2017
Busano

ENHAVO

Enkonduko (Mireille GROSJEAN):	3
Maria MAJERCZAK: <i>EAQUALS - altaj internaciaj normoj en lingvoinstruado</i>	4
Mireille GROSJEAN: <i>Instruado de Esperanto en elementa lernejo en Benino</i>	10
Raporteto pri la programo Ekparolu!	11
HU Guozhu: <i>Ni iru la vojon celitan</i>	12
Stefan MACGILL: <i>UEA kaj la instrua agado</i>	19
Stefan MACGILL: <i>Jaro de la Lernanto - celoj, strategioj, kunlaboro</i>	19
Jozefo NÉMETH: <i>La hungara ILEI-sekcio</i>	23
Luiza CAROL - Mirejo GROSJEAN: <i>Dek jaroj en Esperanto-lando</i>	26
Klaus SANTOZKI: <i>Du ludoj por ŝanĝo de la instru- kaj lernmetodoj</i>	29
El la landoj kaj sekcioj (AL, BJ, FI, DE, IT, PL)	31
Korekto	40
La 51-a Kongreso de ILEI – Madrido 2018 (R. PETROVIČ, M. GROSJEAN)	40
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj	42

ESTRARO DE LA LIGO

- Prezidanto:** Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Rilatoj kun UNESKO kaj FIPLV. Observanto de ILEI ĉe UEA. Informado al ekstero. Ekzamenoj.
- Vicprez.:** GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitata agado.
- Sekretario:** Emile MALANDA NIANGA. P. O. BOX 2787 Cape Town 8000, Sud-Afriko. <emalandan@yahoo.fr>, <ilei.sekretario@gmail.com>. Kontakto kun sekcioj. Koleghelpa Kaso.
- Vicsekr.:** Elena NADIKOVA. ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>. Lerneja agado. Eo-centroj.
- Estrarano pri financoj:** William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.
- Estrarano:** Radojica PETROVIČ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Kongresoj de ILEI, rilatoj kun TEJO, retaj aferoj, „Interkulturo”.
- Estrarano:** Ivan COLLING. Cx.P. 1701, Ag. Mal. Deodoro, Curitiba, PR. BR-80011-970, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>. Universitata agado.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Membroj:

Duncan Charters, Usono,
Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio,
Università degli Studi di Roma
„La Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute,
Kolkata; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio,
Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Iłona Koutny, Pollando/
Hungario, Uniwersytet im.
Adama Mickiewicza w
Poznaniu; AdE¹

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario, vic-prez. de UEA

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного
Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Sur la dorsa kovrilo: Magda-
lena Kujawska, studentino en la
Jagelona Univ. en Krakovo,
gvidas lecionon dum la 8-a
lingva festivalo. (Fotis studento,
Karol Bernacki) (*Vd. p.4*)

Enkonduko

Karaj legantoj,

Mi petas pardonon. Vi ne ricevis nian organon aŭ ricevis ĝin kun granda malfruo, tio estas grava paneo. Okazis eĉ pluraj fuŝoj laŭ iu universala leĝo de „maksimuma paneado”, kiel okazas, kiam diversaj problemoj viciĝas en tago, kiam oni fine pensas: pli bone mi estus restinta en mia lito hodiaŭ matene...

Okazis en diversaj landoj paneo de la liverado per poŝto de IPR 2016/3 kaj 4. Okazis paneo en la dissendado de 2017/1 per belga eble tro malmultekosta firmao. Laŭ konfirmoj vi ricevis ĝin komence de majo (tio dankeblas al la denova preso, ĉar ĉiuj pakajoj en februaro malaperis). Kaj hodiaŭ, la 11-an de majo, ni fermas la preparadon de IPR 2017/2. Espereble la aperritmo de nia organo retrovos sian pli fruan akuratecon. Por esti certaj, ke IPR 2017/2 atingos vin ĝustatempe, la estraro de ILEI decidis okazigi la printadon kaj elsendadon el Slovakio. Ni nun esploras pri fidinda solvo por IPR 2017/3 kaj la sekvaj numeroj.

Pri grafikaj kreadoj diversaj junuloj kontribuas al la bezonoj de ILEI. Unu el Koreio kreis la stelforman emblemon, kiun ni elektis por nia 50-a Kongreso. Unu alia el Serbio, denove Emese, kreis alian tre belan emblemon (*vd kovrilpaĝe*) kaj nia korea sekcio konservis ĝin por si mem. Ni deziras al vi agrablan legadon!

Mireille GROSJEAN
Prezidanto de ILEI

EAQUALS - altaj internaciaj normoj en lingvoinstruado

de Maria MAJERCZAK (Pollando)

Pri la aŭtoro

Maria Majerczak estas filologo, diplomita pri latinidaj lingvoj kaj kulturoj. Ŝi ankaŭ okupiĝas science kaj didaktike pri Esperanto, ekde sia studperiodo. Ŝi laboras en la Jagelona Universitato en Krakovo, Pollando. Ŝiaj specialiĝ-fakoj estas: metodiko de instruado de fremdaj lingvoj, formado de lingvoinstruistoj, teoria lingvistiko kaj kelkaj sferoj de Esperanto. Ŝi instruas en la universitato la Internacian Lingvon konstante (je ĉiuj niveloj) kaj gvidas la Studentan Sciencan Esperanto-Rondon. En la jaroj 1997-2010 ŝi respondecis pri la Pola Sekcio de ILEI (pli da informoj pri ŝia E-aktiviado oni povas trovi en Panteono de Edukado.net).



Resumo

En la artikolo estas prezentita la hodiaŭa metodo instrui kaj lerni lingvojn, kiel bazo por la internaciaj kvalit-normoj de EAQUALS, la mondscale plej grava organizaĵo, atestanta altan kvaliton en instruado de fremdaj lingvoj. La kazo de la atribuo de la EAQUALS-kvalit-marko al la Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato en Pollando havas signifon por la Internacia Lingvo.

Ŝlosilvortoj:

EAQUALS, kvalito en lingvoinstruado, tendencoj en instruado de lingvoj, la komunika metodo, KER, CEFR, universitata Esperanto-instruado, Jagelona Universitato

La hodiaŭaj tendencoj en instruado de lingvoj

La ŝanĝoj, kiuj okazadis en la mondo dum la lastaj jardekoj, kreis la neceson pri reformulo de la lernbezonoj kaj pri al ili konforma prilaboro de lingva materialo (la procezo estis komencita jam en la 70-aj jaroj de la antaŭa jarcento, sub la gvido de la Konsilio de Eŭropo). La *novicia-funkcia* aranĝo de la lingva materialo celis disvolvodon de la kapablo efike komunikiĝadi en diversaj kuntekstoj, prenitaj el la reala vivo (antaŭe, lernolibroj kreadis

fikciajn tekstojn por lingvolernado). Sociaj interagoj, simulataj dum lingvaj lecionoj, iĝis kaj rimedo kaj la celo de lingvolernado. La nocia-funkcia aliro iĝis bazo por la *komunika metodo*, kiu disvastiĝadis ekde la okdekaj jaroj de la 20-a jarcento kaj kies ĉefa ideo estas lernado per komunikado por komunikado. La komunika metodo ofte estas konsiderata kiel ĝenerala aliro, kiu inspiris la ekestojn de diversaj kompletaj, originalaj metodoj, kun lernolibroj kaj akompana didaktika materialo.

En la komunika metodo sukceso de lingvoellerno estas taksata surbaze de la kontrolo, kiel bone la lernantoj disvolvis sian komunik-kompetenton.

En 2001, la Konsilio de Eŭropo lanĉis la Komunan Eŭropan Referenckadron por Lingvoj (*Common European Framework of Reference for Languages, CEFR*; esp. KER).

La komunika metodo jam akiris pli novan formon, tiun de *aga metodo*, rekomendata de KER. Ĝia esenca trajto estas realigado de konkretaj, praktikaj taskoj (ne regula lernado de difinitaj eroj de gramatiko aŭ tekstoj). Ĉiam pli ofte ĝi estas praktikata kiel *kunaga metodo* (la lernantoj kunagas dum plenumado de lerncelaj soci-lingvaj komunik-taskoj). Tiu metodo prezentas partoprenan aliron, kontraŭon de individueca lernado.

Jen kelkaj gravaj, ĝeneralaj trajtoj de instruado-lernado de lingvoj, ligitaj kun la ĉi-supre prezentitaj aktualaj ideoj kaj tendencoj.

La instruisto ne estas plu la ĉefa persono de la didaktika procezo. Jam la komunika metodo lokis la lernanton en la centro de tiu procezo. Dum jarcentoj la instruisto estis konsiderata kiel la sola scioposedanto. Hodiaŭ li aŭskultas proponojn, konsilojn de tiu, kiu lernas, li estas malferma al liaj bezonoj. La lernanto estas partnero. Li eniras dialogan rilaton, t.e. dusekstantan rilaton: instruisto \leftrightarrow lernanto. Li kundirektas la lernadon, sed samtempe ankaŭ kunrespondecas pri ĝi.

La plenan kontrolon de la didaktika laboro, kiu estis farata de la instruisto, anstataŭas la aŭtonomeco de ĉiu el la partneroj: kaj la instruisto kaj la lernanto. En tia situacio, tiu lasta lernas pli konscie, pli konforme al siaj lingvaj bezonoj kaj pli memrespondece. Liaj lernstrategio kaj konduto konformas al la defioj de la hodiaŭa mondo.

En la nuna tempo, la ĝenerala tendenco estas instruado de lingvo por praktikaj celoj, tial anstataŭ liverado de la samaj scioj al ĉiuj membroj de la

grupo kaj al ĉiuj grupoj, oni realigas individuan aliron, kiel eble plej proksiman de la bezonoj de ĉiu el la lernantoj.

Dum la lastaj jardekoj oni multe pli aprezas disvolvado de kapabloj ol simplan transdonado de scioj. Konstruante la instruprogramojn, oni atentis la funkcia(j)n celo(j)n de ĉiu instruata ero. Ŝanĝiĝis ankaŭ la instruformoj. Nun gravas task-plenuma, projekta, kazo-studa k.s. instruado, adaptita al la konkretaj, praktikaj bezonoj de la studantoj.

La iama kontrolo de la lernrezultoj, havanta nur taksantan karakteron, laŭ la modernaj normoj devus esti formanta.

La organizaĵo EAQUALS



Sur la ĉi-supre prezentitaj ideoj kaj praktikoj baziĝas la normoj por lingvo-instruado, prilaboritaj de la internacia faka organizaĵo EAQUALS (Evaluado kaj Akreditado de Kvalitaj Lingvaj Servoj - *Evaluation and Accreditation of Quality Language Services*). La sende-

penda kaj senprofitcela organizaĵo estis fondita en 1991. Ĝi estas registrita en Britio. EAQUALS atestas altan kvaliton en la tuta sfero de instruado de fremdaj lingvoj, kaj ĝi estas la mondscale plej grava organizaĵo, laboranta en tiu kampo.

EAQUALS estas kunlaboranto de la Konsilio de Eŭropo (*Council of Europe / Conseil de l'Europe, CoE*). Interalie, ĝi partoprenis la ellaborado de la Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj (KER). La organizaĵo estas konsultata de la Eŭropa Komisiono (*European Commission, EC*) pri lingvoinstruado, ĝi kunlaboras kun la Eŭropa Centro de Modernaj Lingvoj (*European Centre for Modern Languages, ECML*), kun ISO - la Internacia Normiga Organizaĵo (*International Organization for Standardization*) k.a.

La celoj de EAQUALS estas:

- apogado de la kvalito en instruado kaj lernado de fremdaj lingvoj, i.a. per faka subteno al lingvoinstruistoj,
- ellaborado de altaj kvalit-normoj kaj
- akreditado de la ilin realiganta agado de lingvoinstruaj institucioj, kiel lernejoj kaj lingvaj lernejoj.

EAQUALS preparis unikajn ekspertizojn por praktika aplikado de KER en programoj rilate kursoplanado, instruado kaj taksado.

Laŭ la foje aŭdata opinio de fakuloj el eŭropaj lingvaj institucioj, en la sfero de lingvoinstruado „oni povis elpensi nenion pli bonan ol la Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj” (KER). Ĝiaj aŭtoroj tamen ne celis krei modelon, kiu estus deviga por lingvoinstruistoj, sed la lingvoinstruaj medioj mem adoptis ĝin, kiel tre taŭgan kaj utilan ilon. KER transiris la eŭropajn landlimojn kaj disvastiĝis en la mondo.

La akredito de EAQUALS konfirmas altan kvaliton de la instru-lerna procezo en ĝia tuta kunteksto. La kandidatoj devas plenumi 50 normojn, kiuj grupiĝas en 12 kategorioj:

1. gvidado de la lingvoinstrua institucio
2. instruado kaj lernado
3. didaktika planado
4. ekzamensistemoj
5. didaktikaj resursoj, biblioteko
6. lernmedio
7. diversaj servoj
8. kvalito
9. altaj profesiaj kvalifikoj de la instruistoj
10. oficialeco de la dungo-kondiĉoj
11. interna komunikado
12. ekstera komunikado¹.

Inter la normoj troviĝas postuloj pri konformeco de la instruado al la EAQUALS-normoj kaj efikeco de la instruprogramoj, taksado kaj precipe ĝia ligo kun KER, kompetento kaj spertoj de la instruistoj, estroj kaj oficistoj, ankaŭ profesieco de la institucia mastrumado, institucia mem-taksado, internaj sistemoj por kvalitcertigado, labor-kondiĉoj de la instruantoj.

La EAQUALS-akreditado aplikeblas al la agado de ĉiaspecaj lingvaj centroj, universitataj kaj aliaj, ŝtataj kaj privataj. La normoj ne havas preskriban karakteron (kvankam la bazaj postuloj estas precize difinitaj), do ili estas adapteblaj al diversaj edukaj kunteksto, ekz. al lingva lernejo realiganta specialajn celojn aŭ al la universitata sistemo de lingvoinstruado. La akredita sistemo estas realigebla rilate al instruado de ĉiuj lingvoj, ĝi koncernas ankaŭ

¹ <https://www.eaquals.org/our-members/become-a-member/accredited-membership/the-eaquals-quality-standards>, lasta vizito: 10 apr. 2017.


ĉiujn landojn. Aktuale, la EAQUALS-postulojn realigas institucioj instruantaj 32 lingvojn en nur 33 landoj de la mondo².

La EAQUALS-normoj en la E-instruado en la Jagelona Universitato



Komence de 2016, la instruado de Esperanto en la Jagelona Universitato ricevis la internacian kvalit-rekonon de EAQUALS. La internaciajn normojn realigas ankaŭ instruado de dek aliaj lingvoj, ĉiuj disponigataj en la granda fremdlingva fako de la universitato, la Jagelona Lingva Centro. Tiu fakto estas grava por la universitato, ĉar la akredito donas prestiĝon, ĝi signifas ankaŭ garantion pri la kvalito de la ofertataj kursoj. Ĝi gravas ankaŭ por Pollando, ĉar la universitato estas la unua kaj sola supera lernejo de la lando, kiu realigas la internaciajn EAQUALS-normojn, kaj unu el la nemultaj en Eŭropo. Eble aliaj universitatoj sekvas ĝin.

La akiro de la nemovada EAQUALS-kvalito gravas ankaŭ por Esperanto: la nomo de la lingvo troviĝas en la listo de la 32 lingvoj, kies instruado akiris ie en la mondo la prestiĝan EAQUALS-markon. Tio pravas, ke instruado de Esperanto povas realigadi la samajn altajn normojn, kiel tiu de la angla, hispana aŭ aliaj lingvoj. Efektive, por EAQUALS Esperanto estas samrajta kun aliaj lingvoj. En tiu organizaĵo oni ne elvokas ĝian laŭplanan naskiĝon, kiu ja ne estas grava el la komunika vidpunkto.



La tabelo, prezentanta la lingvajn nivelojn laŭ KER (CEFR) troviĝas en ĉiuj studĉambroj de la lingva centro kaj sur koridoraj muroj. La studentoj mem povas kontroladi la akiritajn praktikajn lingvajn kapablojn, je ajna momento de la lernado. (Fotis Maria Majerczak)

Specialajn kriteriojn oni prilaboris por la latina lingvo, kiu „ne estas parolata lingvo” (informo de unu el la ĉefaj fakuloj de tiu organizaĵo, eldirita antaŭ la lingvo-instruistaro, dum la unua vizito en la krakova universitato).

² <https://www.eaquals.org/our-members/accredited-members/>, lasta vizito: 10 apr. 2017.

Dank' al la akredito, en la retpaĝaro de EAQUALS oni trovas la informon, ke Esperanto estas instruata en eŭropa universitato (ja, kutime, oni eĉ ne mencias tiun lingvon inter la lingvoj de Eŭropo!).



Gestudentoj de la Jagelona Universitato ĉiujare gvidas E-lecionojn en grandaj publikaj aranĝoj, regionaj aŭ landaj. Ili uzas elementojn de la instrumentodoj praktikataj en la lingva centro de la universitato. Jen komunika ekzerco dum la leciono okazinta kadre de la 8-a krakova lingva festivalo, la 1-an de aprilo 2017.

La Jagelona Universitato estas la sola supera lernejo en la mondo, en kiu Esperanto-instruado havas la internacian EAQUALS-markon. Eble tiu fakto utilos al la Internacia Lingvo, alproksimigante al la Esperanto-medioj la ideon de akirado de modernaj, altaj normoj en instruado de la lingvo. Lokoj, kie oni lernas Esperanton, povus esti inter la plej bonaj kaj kvalite rekonitaj. Tio estas defio ne nur por Esperanto, sed ankaŭ por diversaj universitatoj kaj aliaj lingvoinstruaj institucioj.

Gloso

Evaluado - taksado

Bibliografio

La oficiala retpaĝaro de EAQUALS: <https://www.eaquals.org>

Majerczak, Maria, *Internacia EAQUALS kvalit-rekono por E-instruado en la Jagelona Universitato*. <http://edukado.net/novajhoj?id=625>, dato de la publikigo: 27 majo 2016.

Instruado de EO en elementa lernejo en Benino

de Mireille GROSJEAN (Svislando)

Abomey-Calavi estas granda urbo sude en Benino, kies limo kun Kotonuo tute ne videblas pro la fakto, ke la du urboj kunas kiel Buda kaj Pest. Eĉ sen lima rivero. En Abomey-Calavi estas la universitato de Benino, UAC, kie studas la plej lertaj gestudentoj de la lando, proks. cent mil.

En tiu urbego en trankvila kvartalo naskiĝis en 2016 nova privata lernejo per la laboro de du kuraĝaj instruistoj, kiuj volas doni al eĉ malriĉaj infanoj valoran instruadon. Ili konstruis domon kun klasoĉambroj kaj arigis geinstruistojn. Mecenato helpas. Ili decidis enkonduki Esperanton. Por fari tion, ili ekrilatis kun Privas TCHIKPE, prezidanto de la NRO „Scio Sen Bariloj” (SSB).

La unua kontakto okazis la 15-an de februaro 2017 dum mia restado en Kotonuo. Kiel membro de SSB mi iris kun Privas TCHIKPE al la lernejo kaj en la laborĉambro de la direktoro okazis prezento de EO kaj diskuto kun la gvidantaro. La unua demando estis, al kiuj klasoj ni donu tiun instruadon? Decido venis: al la 4-a kaj 5-a klasoj, do al lernantoj en la aĝo de dek kaj dek unu jaroj.

La inaŭgura leciono okazis la duan de marto. Antaŭ ĝi okazis solena subskribado de interkonsento inter la lernejo Hadeignon kaj „Scio Sen Bariloj”. (*La foton pri subskribo vd. sur p.43*). Privas TCHIKPE unue alfrontis la du klasojn kune kaj la instruistaron, ĉiujn arigitajn en granda klasoĉambro. Li elektis la prezenton de la alfabeto kaj sonoj en tiu fame konata harmonio, kaj poste prezentis diversajn frazetojn kiel „Saluton!”, „Kiu vi estas?”, „Mi estas Karlo”. Lia celo estis, ke la lernantoj povu tuj post la hejmenreveno diri kelkajn frazojn al siaj gepatroj.

Mi havis dudek minutojn post tio kaj mi elektis enkonduki kelkajn sufiksojn. Kato-katino-katido; bovo-bovino-bovido, leono-leonino-leonido. Post tiuj 3 radikoj mi skribis „kolombo” kaj venigis sinprezantan lernanton al la tabulo. Li senprobleme skribis la vortojn kolombo-kolombino-kolombido. Mi povis montri al la aŭskultantaj plenkreskuloj, ke okazas kvazaŭ miraklo: tiu knabo lernas Esperanton de eĉ ne 30 minutoj kaj kapablas skribi vortojn, kiuj ne

ekzistas en lia lingvo, la lingvo de lia instruado (la franca). Mia celo estis montri tiun mirindan fenomenon: la strukturon de Esperanto (*vidu foton*).



Mi parolis pri brikoj, ĉar ĉiuj vidas domojn en konstruo kaj brikojn en atendo. Do briko kolomb- , briko -in- , briko -id- , briko -o. En la franca lingvo ekzistas la vorto „colombe” por la specio, sed ne ekzistas precizaj vortoj por la masklo, la ina birdo kaj la beba kolombo. En Esperanto tion oni povas konstrui. La rezulto de tio estas, ke la geinstruistoj ankaŭ eklernis Esperanton (vidu la aldonan prezenton de la instruisto Kingslim EDAH en la rubriko *El la landoj kaj sekcioj*, kiu nome de SSB instruas Esperanton en tiu lernejo Hadeignon).

Raporteto pri la programo *Ekparolu!*

ekparolu

Nun laboras **49** geonkloj kun **51** genevoj.
Finis siajn studojn **12** genevoj.
Oni okazigis **344** sesiojn, estas planitaj **13** pliaj sesioj. (Dato: 10 majo 2017)
Ligo: <http://edukado.net/ekparolu>

NI IRU LA VOJON CELITAN

de HU Guozhu (Ĉinio)



Noto: Publikiĝis en „EL POPOLA ĈINIO” (EPC) n-ro 8/1994 p.10/11 en rubriko „Voĉo de Esperantistoj” jena verko de HU Guozhu. 2001 Guozhu aldonis iomete da informoj pri interreta laboro.

• Senpenta elekto

Mi ekkonis kaj komencis lerni Esp-on en 1956, 18-jara, nelonge post kiam mi eklaboris en tekstila fabriko. Kaj, depost tiam, ĝuste kiel diris la versoj: forflugis la tempo je nura fingrosvingo.

Mi tenis min fidela al mia profesio, diligente plenumante mian laboron en fabriko, dume la profesio ankaŭ pagis al mi ĉion: salajro, loĝejo, rango, vivrimedo k.a. La iama novico nun jam fariĝis supera inĝeniero en tekstila fabriko.

Mi tenis min fidela en la vicaro de ĉinaj esp-istoj, tamen, por diri la veron, Esp-o ja donis al mi neniun praktikan utilon en socia vivo. Male, ĝi alportis al mi nemalmultajn sortobatojn: mi perdis floraĝan ĉarman junan edzinon, mi perdis ankaŭ mian stomakon, sanon k.a.

Jes, efektive, ŝancoj en la vivo ja aperis unu post alia, ĉiam novaj. Ne malpli ol unu fojon mi frontis antaŭ allogaj ebloj: nur se mi konsentus iom konvertiĝi, pagante al alia sfero iomete, ekz-e (kelk)dekonon, da energio, kiom mi oferis al Esp-o, mi jam povus, laŭ kriterio de utilismo, "vivi pli senĝene".

Tamen ĉiufoje mi nur ripetis mian unuafojan elekton, iri sur la vojo de ni esp-istoj, pli kaj pli malproksimen, kaj neniam volis retroiri.

Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita Ĝi estas, la voj' elektita.

Mi amas mian patrujon Ĉinio. Mi amas Esp-on. Por ili mi volonte oferu mian ĉion.

Kio instigas min, estas la nobla idealo de Esp-o, estas la senegoisma sindonemo de eminentaj esp-istoj, veteranaj kaj samgeneraciaj. Tio estas la

fonto de mia forto, dank' al kiu mi sukcesis persiste marŝi kaj surgrimpi, venkinte multe da malfaciloj.

- **Estimindaj veteranoj**

Dum multaj jaroj mi restis izolita memlernanto de Esp-o, tamen mi havis la feliĉon ricevi helpojn preskaŭ de ĉiuj veteranoj inter la malnovaj ĉinaj esp-istoj.

La unua artikolo pri Esp-o, kiun mi legis, estis la raporto pri la 41-a UK en Kopenhago, verkita de estimata Chen Yuan, de kiu mi unuafoje aŭdis la nomon Esperanto.

Kiu kondukis min sur la vojon de Esp-o, estis la veterano s-ano Honfan, kiun mi ĉiam dankas kun karmemoro! Estis li, kiu pacience skribis longan leteron, mentore respondante al mia demando de analfabeto: „Kio estas Esp-o?” Estis li, kiu serĉadis pli ol unu monaton en pekina brokantejo de malnovaj libroj, kaj pagante anstataŭ mi, aĉetis kaj sendis al mi la unuan E-lernolibron. Estis li, kiu varbis min al Traduka Ekzercado, organizita de EPCĈ. Estis li, kiu invitis min fari esp-igojn por EPCĈ. Li memkonscie faris ĉion ĉi tion, celante kulturi novulojn por la ĉina EO-movado.

Kiel mi lernis Esp-an prononcadon, estis stranga anekdoto. Kiam mi jam povis skribi leteron en Esp-o, mi ankoraŭ scipovis voĉlegi nenion, eĉ alfabeton, en Esp-o. Foje, iu mia kolegino oficveturis al Ŝanhajo. Laŭ mia peto, ŝi vizitis s-anon Sanio, lernis de li Esp-an prononcadon, kaj poste, funkciante kiel homo-diktafono, transkomunikis al mi la prononc-povon. En la nuna tempo, kiam diktafonoj ege populariĝis, mia anekdoto aŭdiĝas vere neimagebla mito kvazaŭ el trans maroj.

*Fortikan herbon montras venta vetero.
kaj neflekseblan lojalon vidigas severa danĝero.*

Esp-isto, kiu plej imponis al mi, estis s-ano Tikos. Li eksponis al mi kaj miaj samtempuloj la grandan personecon de esp-isto, ke ni havu la intiman konon pri la eco de „verda koro”. Tio okazis en la malfacilaj jaroj, kiam la ĉina EO-movado devis resti en stagno. Tikos, per sia individua forto, je la persona nomo de unuopulo kaj per individua korespondado, kolektis Esp-amantojn tra tuta Ĉinio kaj akumulis forton por la revekiĝo de la ĉina EO-movado. Li mempage eldonis mimeografitajn lernilojn, kiujn li dissendis, donacante aŭ senpage pruntdonante, al ni por nia lernado. La karan (kaj raran) libron *Parnasa Gvidlibro*, kies ekzempleroj tiam en Ĉinio troviĝis nur du, mi povis

legi nur dank' al lia malavara helpo. Mi mankopiis, de la unua litero ĝis la lasta, la tutan libron, kaj, poste, mem verkis en la ĉina lingvo *Esperantan Metrikon* kun aparta konsidero por kontentigi la bezonon de ĉinaj s-anoj, kaj, la unuan fojon iniciatis enkonduki ĉineskojn en la Esp-an poezion, kun kelkaj specimenoj.

La plej grava influo de Tikos sur min, estas la devkonscio pri misio kaj la stilo „ek al laboro”, nek atendi nek dependi. En la rondo de Esp-o, nombro de profesiaj esp-istoj ĉiam estas relative malpli multaj. Ni povas rimarki, ke multaj esp-istoj inkluzive D-ron Zamenhof, ekokupis sin per granda laboro plej ofte ne pro la ordono de sia profesia superulo. Tial, neprofesiaj esp-istoj devas havi konscian respondecon pri sia historia misio kaj la animstaton konsideri la mondan aferon kiel sian taskon. Tio ankaŭ konformas al la spirito de ĉinaj batalantoj „ne forgesi zorgi patrolandon eĉ en plebaneco.”

Ĉinoj alte taksas dankemon, kaj, miaopinie, la plej bona maniero por danki, estas preni la pionirojn kiel modelojn. Mi ĵuris, ke mi nepre laboru kaj luktu, per kaj por Esp-o, kiel ili, senplende kaj senpente.

- **Verdaj spuroj**

Mi dediĉis min por propagandi kaj disvastigi Esp-on, funkciigi kursojn kaj doni lecionojn. Mi kompilis lernolibron: la Esperanta Elementa Kurso. En dek jaroj tiu libro estis represita pli ol dek fojojn, sume je tridek mil ekzempleroj, kiuj cirkulis tra la tuta lando kaj la lasta fine estis oficiale eldonita en 1992.

Pro mia laboro en EO-instruado mi fariĝis membro de ILEI kaj unu el la tri rajtigataj ekzamenantoj en Ĉinio por la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA.

Mi ankaŭ partoprenis en laboro de la Hubei-a EO-Asocio (HEA), kiu inaŭguriĝis la 1-an de majo 1979 kiel la unua provinca EO -Asocio en Ĉinio. Al la jarkunveno, okazigita de HEA je la 25-26-a de julio 1981 en la urbo Huangshi, ĉeestis pli ol 200 ĉinaj esp-istoj de 26 provincoj kaj municipoj. Tio estis senprecedenca en la ĉina EO-movado. Tiam ni ankaŭ aŭdace unufoje uzis la nomon Loka Kongresa Komitato LKK, kaj mi funkciis kiel „prezidanto de LKK”³.

Por ĉinaj EO-memlernantoj, precipe por tiuj izolitaj, estis tre malfacile akiri EO-lernilojn. Por daŭra lernado mi mankopiis dekelkajn gravajn ĉefverkojn

³ Noto de la redaktoro: en 2017 en Internacia Rajtigita Ekzamenantaro membras dek ĉinoj.

de Esp-o, senescepte en kompleta teksto. Ne malmultaj el ili estis verkoj de Kalocsay. Oni iam diris, ke estas tute inde, se ni lernu Esp-on eĉ nur kun la celo legi kaj kompreni tiujn poemojn de Kalocsay. Mi konfesas, ke mi tute konvinkiĝas pri tiu aserto.

En 1986 unuafoje havis la okazon ĉeesti UK: la 71-an en Pekino, 30 jarojn post kiam mi komencis lerni Esp-on. Mi bone konsciis, ke tio estas por mi tre rara (aŭ unika) ŝanco por vidi la panoramon de universala Esperanto-Movado. Mi kunportis dikan volumon de *Esperanta Antologio*, kiun mi mem mankopiis kaj bindis. Vidante tiun kuriozaĵon, multaj s-anoj de diversaj landoj miris kaj nomis ĝin enkorpiĝo de ĈINA DILIGENTO. Estimata pioniro Prof. Juan Regulo Perez, la eldoninto de la nomita antologio, kaj fama Esp-a poeto Reto Rossetti, unu el la kunaŭtoroj, ambaŭ ĝoje donis sian aŭtografon sur mia (krom)ekzemplero de Esp-a Antologio. Poste, Canuto-Fonduso helpis min membriĝi al UEA, kaj ankaŭ s-ino Ada Fighiera Sikorska, la ĉefredaktoro de *Heroldo de Esperanto*, dum jaroj malavare donacis al mi la prestiĝan gazeton kun longa historio. Tamen mi povas danki kaj rekompenci nur per ago sed ne per mono.

Pro manko de ŝancoj por internacia komunikado, ĝeneraldire, la kapabloj de aŭdo kaj parolo de ĉinaj esp-istoj estis relative malpli bonaj. Tamen, en la Pekina UK ankaŭ troviĝis ne malmulte da ĉinaj s-anoj, kiuj scipovis flue konversacii en Esp-o por libera sin-esprimo. Tio vekis interesiĝon de multaj eksterlandaj esp-istoj. Ĉar mi ellernis EO-parolon en medio de izoliĝo sen kompano, tial. Poste *Radio Pekino* sendis disaŭdigon titolitan *La Vojo de Ĉina Esp-isto Hu Guozhu* en 1987-03-29/30, prenante min kiel ekzemplon.

- **Serĉi sciojn en praktiko**

De mia propra sperto mi konvinkiĝis, ke tradukado estas tre bona rimedo por lernado de Esp-o, kaj samtempe ankaŭ vasta tereno por aplikado de Esp-o. Dum multjara lernado iom post iom mi havis la kutimon persisti en traduka praktikado. Mi ĉinigis verkojn, kiuj plaĉas al mi, kaj, pli ofte, esp-igis el la ĉina lingvo.

Mi ĉinigis poemojn de D-ro Zamenhof kaj lian faman eseon: *Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia*. Kiam la ĉina traduko aperis en broŝuro, estimata Tikos donis al ĝi „Postskribo”-n.

Mi partoprenis en la esp-igo de poemoj de Mao Zedong. De la veterano s-ro S.J. Zee mi lernis multajn sciojn utilajn por esp-igo de ĉinaj antikvaj poemoj.

Mi esp-igis verkon de s-ro Lusin: *Matenaj Floroj Kolektitaj en Vespero*. I.a., la prozaĵo *Sinjoro Fuĝino* el la nomita libro poste estis kolektita en la *Ĉina Antologio* (1919-1949).

Mi tradukis en mia soleca legoĉambro, plejofte nur en la postlaboraj tempstumpoj. Tiam antaŭ miaj okuloj ofte aperis la sceno pri Hilda Dresen en kabano dum la Dua Mondmilito. Ekster ŝia fenestro estis aeratako, alarmoj, eksplodoj de bomboj, tamen Hilda Dresen aplombe esp-igis versojn ĉe sia tablo. Kiel nobla, granda kaj pura koro !

Tikos iniciatis landskalan aktivadon *Traduka Ekzerco* en 1978-1980. Mi estis komisiita fari la resumojn por ĝi. Poste mi ankaŭ prezidis la rubrikon *Traduka Konkurso de La Mondo*, la organo de Ĉina Esperanto Ligo (ĈEL), dum 1981-1987. Tio estas por mi neforgesebla travivaĵo. Dum dek jaroj mi estis devigata mem studi teorion de traduk-arto kaj resumi spertojn de tradukado, kio donis al mi multe da utiloj, kaj mi ankaŭ ricevis milojn da leteroj de EO-lernantoj el diversaj lokoj tra tuta Ĉinio. Rezulte de tio mi havis multajn plumamikojn.

- **Benediktana Esp-igo de Liaozhai**

Post pli ol 20 jaroj da serioza preparo, en la 90-aj jaroj, mi komencis esp-igon de la ĉina majstro-verko *Strangaĵoj de Liaozhai*, verkita de Pu Songling (1640-1715). Tiu ĉi novelaro estis tre populara en Ĉinio, ĝuante renomon de la „reĝo inter ĉinaj noveloj”. Antaŭ pli ol unu jarcento jam aperis ĝia fremdlingva traduko. Ĝis nun aperis pli ol 30 tradukoj en 21 fremdaj lingvoj, sed ankoraŭ neniu esp-a eldono en kompleta teksto. Konigi tiun elitajn ĉefverkon de antikva ĉina literaturo per nia kara lingvo Esp-o, nature, estas signifoplene. Tamen, ankaŭ ne estas troige, se ni nomus ĝin benediktana laboro. Precipe, en nuna tempo, kiam la senĉese ŝvelanta mamonismo kaŭzas polucion al nia vivo-spaco, kiam la nejusta socia distribuado vundas la koron de la ĉina intelektularo, kiam la inflacio pli kaj pli peze subpremas al nia vivo, kaj aparte menciinde, kiam antaŭ la tradukanto vidiĝas nenia eblo aŭ promeso por eldoniĝo de la traduko. Malgraŭ ĉio ĉi tio mi daŭrigas ankoraŭ la longan marŝon en pura malriĉeco kaj soleco, sen konsidero pri praktikaj utiloj. Tio estas vere kun aldonita nuanco de tragedia brava.

„*Ho, ĉesu!*” *bonkore la homoj admonas,---*
Ne ĉesu, ne ĉesu !” *en kor' al mi sonas.*”

Kio ankoraŭ subtenas min, estas idealo, modeloj, amikeco, kompreno kaj prizorgo.

Mia intima amiko Shi Chengtai rakontis al mi pri la esp-igo de *Dekamerono* fare de G. Waringhien. De antaŭ la Dua Mondmilito Prof. Waringhien jam komencis la esp-igon, kaj, ĝis li forpasis en 1992, li finis la esp-igon de la unuaj „Tri tagoj”. Nun s-ano Perla Martinelli, ĉefredaktoro de *Literatura Foiro*, jam transprenis lian stafeto-bastonon, daŭrigante la esp-igon de la mondfama verko.

Mi scias ankaŭ, ke la japana s-ano Ludovikito dum multaj jaroj vivis ermite, sin okupante per la kompilado kaj eldonado de la *Plena Verkaro de Zamenhof (PVZ)*. Ho, feliĉe, la Ĉielo rekompencis la diligentulon, nun fine eldoniĝis 47 volumoj kun 21 mil paĝoj!⁴

La rusa ĉinologo Vasili Mihajloviĉ Aleksejev dum sia tuta vivo plenenergie rusigis la supre menciitan ĉefverkon *Strangaĵoj de Liaozhai*. Lia traduko distingiĝis kiel elito inter diverslingvaj tradukoj de la nomita verko. Inter miaj intimaj amikoj samgeneraciaj ankaŭ nemalmultaj laboras kun simila obstineco: Dum jardekoj Seimin esp-igis la ĉinan romanon *Ruĝdoma Songô*; Shi Chengtai persistas verki originale en Esp-o; Wang Chongfang sin dronigis en kompilado de vortaro; dum komercado Lin Liyuan ne forgesis eldoni la revueton, centprocente malprofitdonan, *Penseo*; Zhang Danchen (Danko) senlace sin dediĉis al EO-instruado kaj aktivado kadre de ILEI... Fakte estas ankoraŭ multaj s-anoj, kies nomojn mi ne ĉiam konas (kaj pro manko de spaco, mi ne povas listigi ilin ĉiujn ĉi tie), kiuj persistas en la ĉina EM, luktante por nia kara lingvo Esp-o. Ilia modelo spronas min marŝi ĉiam antaŭen.

- **Brava reta maratono**

Tempo forfluis. Ni fariĝis feliĉaj homoj, kiuj transiris la jarcenton. Komputilo kaj Interreto eniris nian vivon kaj ŝanĝas la fizionomion de la mondo.

La Esp-movado frontas al novaj ŝancoj kaj defioj. Mi jam ne plu estas juna. Sed mi senĉese penadas, ne volante fariĝi postrestanta de la erao. Per la helpo de esp-istaj amikoj, mi lernas apliki komputilon por servi al nia Esp-movado. Per komputilo mi redaktis la revuon *Penseo*. Dank' al kunlaboro de multaj s-anoj, nia revuo estis honorigita en 1994-09-04 per la renoma Grabowski-premio. Mi ankaŭ pretigis per komputilo la beletrajn broŝurojn *Triptiko de Amrakontoj de Tang-dinastio* kaj *La Senfina Bedaŭro* kaj *La Bivistino* (esp-

⁴ Noto de la redaktoro: en 2017 tiu laboro estas finita kaj aperis 57 volumoj.

igo de famaj eposoj de Bai Juyi), kiuj estis bonvenaj ĉe esp-istaj amikoj post apero. Okaze de la alveno de la nova jarmilo, mi komencis mian retan maratonon, nome, aperigi pecon post peco sur Interreto la esp-igon de la majstra novelaro *Strangajoj de Liaozhai*. Tio estas la daŭrigo de mia laboro pri Liaozhai dum pli ol tridek jaroj en la nova erao. Ĉar mi devas mem tajpi la tekston, tial supozeble tiu maratono eble daŭros ankoraŭ jarojn. Sed, dank' al Interreto, oni povas vidi la plej novajn fruktojn ĉiutage. Ĝis aprilo de 2001, tri volumoj (kio signifas kvaronon) de la tuta libro jam aperis en kompleta teksto sur Interreto. S-ano Gerrit Berveling, prezidanto de *Esperantlingva Verkista Asocio*, sendis retan mesaĝon por esprimi admiron.

*Malfacileco, malrapideco,
Al ni la vojon ne baros,
Sen malhonora malkuraĝeco,
Ni kion povos, ni faros.
Ni paŝon post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.*

- **Leganto skribis**

Leginte la supran raporton, s-ano Sirio Silva, faka delegito de UEA en Brazilo, skribis en EPĈ, n-ro 11 de 1995, jene:

La 8-a numero de El Popola Ĉinio, 1994, publikigis raporton de Hu Guozhu (Hu Ĝuoĝu) sub la titolo NI IRU LA VOJON CELITAN. Mi eĉ ploris pro envio pri tiel granda heroismo. En mia koro mi starigis monumenton al li.

Admirinda ekzemplo de persistemo, amo kaj fideleco al evoluo de la homaro. „Ne ĉesu, ne ĉesu!” en kor' al ni sonas. Obstine antaŭen! Mi tre dezirus esti kiel li.

Vizitu:

- <http://www.elperno.cn/elibro/elibroj.htm> (52 eLibroj de Guozhu)
- <http://www.elperno.cn/penseo/PEN175.pdf>

Adreso de s-ro HU Guozhu: CN-430010 WUHAN. Jiang'an qu. Changyang Yongqingcheng 1 dong 2 danyuan 3201 hao, Ĉinio, hugozhu@21cn.com

Ni dronas en AMO – eĉ edukrilata

de Stefan MACGILL (Hungario)

Ekde la komenco de 2017 diluvas seminarioj pri la Aktivula Maturigo (AMO) kaj rimarkinde, kelkaj prezentas edukajn temojn. Dekomence de la programo, ni evitis tuŝi la temojn de instruista trejnado kaj kursgvidado, ĉar tiuj estas specifaj kampoj, kiujn prizorgas ILEI. Sed la graveco de edukado pelas nin organizi AMO-seminariojn kun pli vastaj edukaj temoj.

La jaro 2017 malfermiĝis per AMO 30 en Munkeno, kiu okazis kadre de la trejnprogramoj de TEJO, realigata per subteno de eŭropaj instancoj. La sekva seminario alportis la programon al ankoraŭ unu nova lando – Kartvelio. En la urbo Kutaisi martfine okazis AMO 31, kadre de la 10a Mezorianta Kunveno. Tio interalie diskutigis la perspektivojn por progresigo de nia lingvo en tiu transformiĝanta mondparto. La rezultoj de la FLAM-analizo pri tio estis detale raportitaj en la komunikoj EKO 5, 6 kaj 7. Tra la paska periodo okazis du seminarioj, partparalele. EKO 32 disvolviĝis apud Bergamo kadre de la Internacia Junulara Festivalo de IEJ (la itala junularo). Ankaŭ tiu seminario ĝuis subvenciadon, kadre de projekto de TEJO pri Eŭrop-Afrika kunlaboro. La paralela seminario estas ankoraŭ okazanta en la Kulturcentro Greziljono, kun eksplicite eduka temo. Gvidantoj estas Mirejo GROSJEAN de ILEI, Sara SPANÒ kaj Stefan MACGILL de UEA, plie Aleks ANDRÉ pri novaj komputikaj lern(ig)ebloj kaj Marion QUENUT.

La sekva seminario kun eduka temo okazos en Svislando (plia unuafoja lando por la AMO-programo) majofine en la vilaĝo Les Brenets sub la titolo ‘AMO-lima’ ĉar eblas de tiu seminaria vilaĝo piediri facile ĝis Francio. Gvidantoj estos movade aktivaj kaj renomaj agantoj. Pri AMO, vidu la retpaĝon: *aktivulo.net* kaj elektu **Aktivula Maturigo** el la menuo. Konklude, kreskas daŭre la gamo da kampoj, kiuj ricevas la delikatan tuŝon de trejnado AMO-plena.

Jaro de la Lernanto - celoj, strategioj, kunlaboro

de Stefan MACGILL (Hungario)

La Strategia Plano de UEA el 2013 antaŭvidis tri nomitajn jarojn, kiujn la Asocio festu. En la 101a UK estis inaŭgurita la Jaro de la Lernanto kaj ĝi venos al fino en la UK en Seulo, tuj post la 50a Kongreso de ILEI.

Celoj de la jaro

Jen kelkaj proponoj por la ŝlosilaj celoj:

- Esplori kiel loki pli centre en la eduka procezo la bezonojn kaj dezirojn de la lernanto.
- Daŭrigi kaj fortigi strategiojn, kiel evoluigi la eblojn de perreta lernado.
- Kuraĝigi retajn kursfinintojn ekuzi la lingvon kaj eniri la E-komunumon.
- Emfazi la gravecon bonkvalite kaj moderne prezenti la lingvon.
- Konvinki la movadon pli forte investi en la trejnado de instruistoj kaj mentoroj.

Strategioj

UEA kaj ILEI kunlaboras por realigi la Jaron. Signifa agado pri precipe la faka parto de la programo okazadas ĉe ILEI.

Jen listo de iuj eroj por la programo de la Jaro:

- Okazigi tutmonde serion da renkontiĝoj, de unuopaj sesioj ĝis plenaj kolokvoj aŭ seminarioj.
- Starigi meĥanismojn por adekvate arigi la rezultojn de tiuj sesioj kun rekomendoj kaj planoj por pluiro.
- Starigi retejon por la komunikado pri la Jaro kaj por kolekti rezultojn: ĉe ‘Aktivulo.net’ kaj ĉe www.ilei.info.
- Pretigi kaj dissendi gazetarajn komunikojn, kiuj celas neesperantistan publikon.
- Starigo de pliaj gvidiloj pri edukrilataj temoj aldone al tiu, kiun ILEI jam pretigis en 2012.
- Konkurso filma okazigata de ILEI (detaloj ĉe EKO 2016-28 kaj ĉe www.ilei.info, ĉefpaĝo Novaĵoj 2016-10-01)

Historio

Ne kredu, ke ĉi tiu ideo koncepti instruiston kiel lernfaciliganton estas nova. La koncepto de ‘malkovro-lernado’ furoris eĉ en novzelandaj elementaj kaj mezaj lernejoj en la sesdekaj jaroj de la antaŭa jarcento. Mi profitis el tio kaj dankegas al la lando pro tiom bonkvalita kaj progresema edukado. Ĝi figuris en la sepdekoj ankaŭ en la instruistaj trejnejoj tiulande. Tiam la malkovrado ne povis okazi pere de komputiloj, sed abundis aliaj ebloj. Bedaŭrinde, tiu

pozitiva filozofio ne multe etendiĝis al aliternejoj kaj universitatoj, kie la jugo de vivdepende gravaj ekzamenoj malkuraĝigis al esplorado kaj kreivo.

Kion faru lokaj grupoj, landaj kaj fakaj asocioj?

La ebloj por grupoj kaj asocioj kaj Esperanto-centroj estas multaj. Elektu el inter:

- Anoncu vin al la komisiono, tiel ke ili kompilu reton da landaj kaj lokaj aktivuloj.
- Prenu aŭ kreu komunikojn kun loka informo kaj sendu ilin al ĵurnaloj kaj radio-stacioj.
- Evoluigu rilatojn kun ĵurnalistoj por altigi la verŝajnon de akcepto de komunikoj.
- Okazigu en Esperanto urban aŭ landan eventon pri la temaro – kun prezentaĵoj, forumoj ks.
- Kunlaboru kun edukaj instancoj okazigi forumojn kaj debatojn pri nunaj edukaj tendencoj.
- Kontribuu al la internacia arigo de referaĵoj kaj rezultoj el la Jaro.
- Kreo de nacilingvaj materialoj kun valoro al edukistoj kaj lernantoj enlande.
- Eblo kunlabori kun *Duolingo* aŭ similaj projektoj cele al pliaj kursoj por aliaj fonto-lingvoj

Eventoj ligitaj kun la Jaro

Temas pri eventoj, kie ILEI kaj/aŭ UEA ludis aŭ ludos rektan rolon en la JdL-markado.

SMG = kun persona partopreno de Stefan MacGill, vic-prezidanto de UEA.

MG = kun persona partopreno de Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI.

Dato	Loko, lando	Evento	Statuso /raporto
Jul 26	Nitra UK, SK	JdL malfermita ene de la Tago de Lernado.	SMG MG, EKO 21.
Jul 30 - Aŭg 6	Nyíregyháza, HU	Konferenco de ILEI kun rilata temo.	SMG MG, EKO 23

Sept 20	Poznano, PL,	Simpozio en la UAM-studsiesio.	SMG, EKO 27
Nov 3-6	Quangzhou, CN	5a ILEI-Seminario en Orienta Azio (ISOA).	MG
Nov 11-12	Timisoaro, RO	Universitata kolokvo internacia.	SMG, EKO 31
Nov 18	Modra-H., SK	KAEST 2016	SMG, EKO 30
Nov 26	Roterdamo, NL	Malferma Tago CO kaj posta seminario	SMG MG, EKO 34
Dec. 24-27	Bunda, TZ	6a Afrika Kongreso de UEA en AMO 29	SMG, EKO 38 - 40
Jarŝanĝe	Saarbrucken, DE	Novjara Renkontiĝo	MG
Jan 6-15	Brisbano, AU	Nacia Kongreso kaj Somerlernejo	Ne venis raporto
Feb 8	Poznano, PL,	Simpozio en la UAM-studsiesio	SMG, EKO 2017-03
Apr 4	Erevano, AM	Kadre de la 10a Mezorianta Kunveno	SMG, EKO 7
Apr 18	Greziljono, FR	Kadre de 'Printempas' kaj AMO 33	SMG MG, EKO 8, 9
Maj 18	Vroclavo, PL	Dua Interkultura Majrendevuo	Certa
Maj 16-23	Colmar, FR	69a Kongreso de IFEF (fervojistoj)	Certa kun MG
Maj 25-28	Les Brenets, CH	AMO-LIMA, kun eduka temo	Certa kun MG kaj SMG
Jun 15-18	Sorriso, BR	52a BKE + 37a BEJK kadre de AMO	Proponita
Junio-fine	Raleigh, US	NASK. Ofte okazas tie AMO-seminario	Proponita

Jul 15-22	Busano, KR	50a ILEI-Kongreso	Certa kun MG kaj SMG
Jul 25	Seulo KR	En la Tago de Lernado de ILEI kadre de UK	Certa: Jarfermo kun MG kaj SMG
20 eventoj	15 landoj	--	12 eventoj okazis

Ĝisdatigita ĝis la 3a de majo 2017.

La kunlaboro de ILEI en la program UNU LEKIONO PRI ESPERANTO POR ĈIU LERNEJANO certe trovas sian lokon en la Jaro. Same la komuna listigo kaj analizo de Esperanto-Centroj (ILEI UEA) kaj la esploroj por nova eldono de la *Manlibro pri Instruado de Esperanto*. Do JdL aŭ ne, ILEI ne dormas!

La hungara ILEI-sekcio

de Jozefo NÉMETH (Hungario)

Jen la kvara, fina parto de serio, kiun iniciatis Mirejo GROSJEAN kun la celo prezenti kvar „fortajn” sekciojn de ILEI (en la antaŭaj numeroj prezentis sin niaj ĉinaj, francaj kaj germanaj kolegoj). Nun sekvas la hungaroj, sed nia situacio estas iom speciala, ĉar antaŭ malpli ol 3 jaroj, okaze de la 20-jariĝo de mia redaktora laboro, mi jam verkis ampleksan artikolon pri la historio de la sekcio (vd IPR 2014/4 p.7-13., http://www.ilei.info/pdf/Ipr144_rete.pdf). Jene mi resumas nur la plej gravajn faktojn pri la sekcio, poste mi raportos pri la pasintaj 2-3 jaroj kaj aldonos iom da personaĵoj.

La unua mencio de nia sekcio venas el la jaro 1974, do, ni ekzistas jam almenaŭ 43 jarojn. Jen listo de niaj sekciestroj: Márta CSER (1974-78), Zsuzsa BARCSAY (1978-1984), Márta KOVÁCS (1985-1995), József NÉMETH (1996-2015), Enikő SEREGHYNÉ ZENGŐ (2016-).

La historio de nia sekcio strikte ligiĝas al la historio de IPR. Ekde 32 jaroj la revuon oni redaktas en Hungario.

Jen la listo de la ĉefredaktoroj: István SZERDAHELYI (1986-87), István ERTL (1987-1991), Márta KOVÁCS (1992-94), Stefan MACGILL (1994), József NÉMETH (1995-).



Pliaj hungaraj iamaj redakcianoj: Ervin Fenyvesi (✠), Johano KIRSCH (✠), Mónika MOLNÁR, Katalin KOVÁTS, Géza KURUCZ, Blazio WACHA.

La hungara sekcio en 1990 decidis fondi ŝtate agnoskatan asocion, kion la juĝistoj akceptis en 1991 (do, pasintjare ni iĝis 25-jaraj). En la asocio rajtas membriĝi ne nur ILEI-anoj. Prezidantoj de la asocio EPME (Hungaria Asocio de Esperantistaj Instruistoj): Márta KOVÁCS (1991-1995), József NÉMETH (1996-).

La datumoj pri nia membronombro inter la jaroj 1984 kaj 2014 troviĝas en la supre menciita artikolo. La membraro ekde 1985 ĉiam superis 35, kaj averaĝe ĝi estis 48 (kune kun la enlandaj membroj). Intertempe mi jam havas la statistikon pri la jaroj 2014-2017:

En 2014 ni havis 47 membrojn, el kiuj 40 estis plenrajtaj, t.e. laŭ nia asocia statuso ili samtempe estis membroj de ILEI.

En 2015 ni havis 51 membrojn, el kiuj 46 estis plenrajtaj. Dumjare unu plenrajta membro forpasis, do, fine de 2015 nia asocio havis 50 membrojn (inter ili estis 3 Honoraj Membroj: Géza KURUCZ, Katalin KOVÁTS kaj Stefan MACGILL, 5 membroj estis nur enlandaj).

En 2016 ni same havis 51 membrojn, el inter ili 45 kolegoj membriĝis ankaŭ en ILEI. Laŭ nia nova statuto, ekde 2017 por esti plenrajta membro oni ne devas membriĝi en ILEI.

Momente ni havas 44 membrojn, el kiuj 4 estas nur enlandaj.

Dum la lastaj jaroj la administrado de la asocio iĝis pli malfacila, ĉar ĉiam pli ofte venas novaj leĝoj, kiujn ni devas obei. Pro tio ni dungas libroteniston, kiu unufoje jare kontrolas la librotenadon kaj helpas fari la impostdeklaron. Krome, pro nova leĝo anstataŭ la ĝisnuna unupaĝa, ni devis krei novan, pli

ol 13-paĝan statuton. Ni dungis advokaton, helpe de li – aŭtune de 2015 – ni ŝanĝis nian statuton, kiun nia asembleo aprobis komence de 2016. Bedaŭrinde la juĝisto ne akceptis ĝin, ni devis kunvoki duan asembleon somere de 2016 kaj fari pliajn modifojn. Aŭtune de 2016 ni estis informataj, ke nia statuto estas jam en ordo. (La honorario de la advokato egalas al nia dujara enspezo pri membrokizoj.)

La jaro 2016-a estis grava en la historio de nia sekcio, ĉar post pli ol tri jardekoj ni povis denove gastigi la Konferencon de ILEI. (Fakte la lastan konferencon, ĉar ekde nun ni havos kongresojn). La ideo, ke ni konkursu por ricevi la rajton organizi ĝin, venis de nia estrarano Enikő SEREGHYNÉ ZENGŐ, kiu poste iĝis la gvidanto de LKK. Por faciligi ŝian laboron, mi transdonis al ŝi la gvidadon de nia sekcio, kion la estraro de ILEI akceptis. En la Konferenco partoprenis ĉ. 120 kolegoj, inter ili estis ĉ. 30 hungaroj.

Kaj kio estas malantaŭ la datumoj?

Mirejo celis prezenti 4 fortajn sekciojn. Mi ne pensas, ke nia sekcio estas forta. Jes, ni estas fortaj, se ni kalkulas, kiom da eminentuloj estis aŭ estas membroj de ILEI-HU. En la E-fako de la universitato ELTE en Budapeŝto kaj en la E-fako de la universitato en Szombathely akiris diplomon multaj kolegoj, kaj parto de ili nun fortigas la movadon en aliaj landoj. Jes, ni estas fortaj, se ni rigardas la statistikon pri membronombroj. Sed la statistiko ne estas ĉio. Inter la du mondmilitoj kaj en la komenca jardeko de la komunisma erao la aktualaj registaroj estis kontraŭ Esperanto. Sed poste sekvis jardekoj, kiam Esperanto rekomencis prosperi. La Ŝtato subvenciis la kulturon, eĉ se laŭ siaj propraj prioritatoj, kaj kie esperantistoj havis bonajn kontaktojn kun la lokaj gvidantoj, oni povis organizi internaciajn amasrenkontiĝojn, kursojn, eldoni librojn ktp. Antaŭ la reĝimŝanĝo en multaj lernejoj oni instruis Esperanton en fakrondoj. Post la reĝimŝanĝo, ekde 1989, la rusa lingvo ne plu estis devige instruata lingvo, sed en multaj lernejoj mankis instruistoj pri aliaj fremdlingvoj. Eluzante tion en multaj lernejoj, oni komencis instrui Esperanton kiel la unuan (kaj solan) fremdlingvon. Mi nomus tion la „kulmino” de la E-instruado en Hungario. 1-2 jarojn poste la situacio rapide ŝanĝiĝis kaj nun jam ĉie oni instruas la anglan kaj germanan, kaj ni alvenis al situacio, ke eĉ la germana batalas por transvivo. Ne plu eblas mal-multekoste eldoni librojn aŭ organizi amasrenkontiĝojn. Ni ne plu havas E-fakojn en la universitatoj kaj Esperanto preskaŭ plene malaperis el la baz-kaj mezlernejoj. En tiaj cirkonstancoj estas vere mirinde, ke la membraro de ILEI-HU restas stabila. Laŭ mi ili restas, ĉar ili estas fidelaj. Sed en la nuna

mondo regas la mono. Estas multaj personoj, kiuj parte aŭ plene vivtenas sin per instruado de Esperanto (private aŭ en lingvolernejoj). La pli granda parto de ili restas ekster la kadroj de ILEI. Kelkaj eksigis, aliaj neniam estis membroj. Oni prave diris: la servojn kiujn ILEI povus doni, eblas ricevi ankaŭ sen ILEI. Ankaŭ la pedagogiaj fakunvenoj de ILEI-HU estas senpagaj kaj publikaj, ilin povas viziti ne nur membroj. Esperanton oni lernas ĉe ni ĉefe por trapasi ŝtate agnoskitan lingvoekzamenon. Kelkaj kolegoj gajnas monon pro tio, sed nia movado gajnas preskaŭ nenion, ĉar la ekzamenitoj restas ekster la movado kaj rapide forgesas la lingvon. Se ILEI-HU volas esti forta ne nur laŭ la nombro, sed ankaŭ laŭ la aktivado de la membroj, ni devus reveni al la stato, kiam Esperanton oni lernis/instruis pro ĝia interna ideo; kaj ne pro mono aŭ aliaj tujaj materiaj avantaĝoj. Jes, oni ankaŭ nun povus instrui Esperanton en baz- aŭ mezlernejoj, kvankam plej verŝajne nur posttagmeze, en fakrondoj. Se la instruisto havas bonan kontakton kun la direktoro, li/ŝi rajtas anonci tiun fakrondon, kaj se li/ŝi sukcesas trovi la minimuman nombron (en mia distrikto la minimuma nombro estas 12), la fakrondo povas ekfunkcii. Sed ĉiuj estas troŝarĝitaj. La infanoj ofte havas pli ol 30 lecionojn semajne (multaj el ili havas ankaŭ privatajn lecionojn posttagmeze). La pedagogoj devas pasigi 32 horojn semajne en la lernejo (kun maksimume 26 instruhoroj + kelkaj pliaj, se kolegoj malsanas), poste daŭrigi hejme la prepariĝon por la sekvatagaj instruhoroj kaj eventuale kromlabori por pli bone vivteni sin (eĉ se la salajroj iom altiĝis en la lastaj jaroj). Do ni vivas, laboras kaj esperas.

Dialogo inter Luiza CAROL kaj Mirejo GROSJEAN

DEK JAROJ EN ESPERANTO-LANDO

En 2015 Luiza verkis eseon, rando de kiu Mirejo komentas kaj faras demandojn, kiujn Luiza respondas.

(La unuaj du partoj aperis en antaŭaj numeroj)

ĈU FACILA LINGVO?

Mi apartenas al la relative malgranda kategorio de homoj kiuj, kvankam ne talentaj pri lingvolernado, iel ĝuas lingvolernadon. Verdire, mi persone ŝategas lingvoscipovon, ne lingvolernadon. Tamen, por akiri ajnan lingvoscipovon kaj por plibonigi ĝin... mi ŝvitas lerni preskaŭ entuziasme.

Por mi, tiuj ŝablonaj reklamoj kiuj rekomendas Esperanton kiel la plej facilan lingvon en la mondo... ja estis ege logaj. Ĉu mi seniluziiĝis pri tio?

Ne. Sed mia nuna vizio pri lingvofacileco iel ŝanĝiĝis.

Mi rememoras, ke en la komenco mi spertis iuspecan eŭforion pro la rapideco, laŭ kiu la nova lingvo estis eniĝanta mian menson. Fakte, post nur kelkaj semajnoj de lernado, mi akiris pli-malpli la lingvonivelon, kiun kutime havas 3-4 jaraĝa infano en sia denaska lingvo. Ŝajnis al mi, ke tre baldaŭ mi scipovos Esperanton samnivele kiel la denaskan lingvon! Sed post kelkaj monatoj, mia Esperanto ŝajnis al mi atingonta la nivelon de la denaska lingvo post ankoraŭ unu jaro. Post du jaroj de lernado (kiam mi jam finis la perfektigan kurson de Boris KOLKER), mi opiniis, ke mi bezonas ankoraŭ kelkajn jarojn por atingi tian celon. Kaj nun? Ĉu mi uzas Esperanton tiom memfide kiel la denaskan lingvon (la rumanan)?

Ne. Sed mi ne plu postulas tion de mi.

Ĝis oni transpasas la mezan nivelon de lernado, Esperanto ja ŝajnas pli facila ol ajna etna lingvo. Poste, ĝi fariĝas ĝuste tiom postulema kiel ajna nendenaska lingvo je kiu oni transpasis la mezan nivelon. Ĝis kiom ajna lingvo proksimiĝas al la nivelo de nia denaska lingvo... tio dependas de la maniero laŭ kiu ĝi eniĝas nian subkonscion. Ekzemple, la enmigrintoj, kiuj vivas en nova lando ekde sia infaneco aŭ adolesko, ofte kapablas alproprigi la novan etnan lingvon eĉ pli bone ol sian denaskan lingvon. Tio dependas de multaj sociaj kaj psikologiaj faktoroj. Cetere, la denaskan lingvon oni lernas senkonscie nur ĝis la aĝo de 5 aŭ 6 jaroj. Post tiu aĝo tiu, kiu ne klopodas konscie plibonigi la nivelon de sia scipovo pri la denaska lingvo, tiu neniam posedas ĝin je la plej alta nivelo.

El la etnaj nedenaskaj lingvoj, kiujn mi konas, la angla estas tiu, kiun mi regas plej bone. Mi lernis ĝin ekde la aĝo de 10 jaroj, mi studis ĝian kulturon en la Universitato de Bukareŝto, mi instruis ĝin dum jardekoj, mi tradukis el ĝi kaj en ĝin, mi amikiĝis pere de ĝi, mi verkis beletraĵojn en ĝi. Mi scipovas ĝin *preskaŭ* samkiel mian denaskan lingvon. Eble se mi transloĝiĝus en angle parolantan landon, mi kapablus atingi en ĝi la nivelon de la denaska lingvo. Sed ĝis nun mi travivis per la angla dum preskaŭ 60 jaroj ĝuste la samajn spertojn, kiujn mi travivis en Esperanto dum 10 jaroj. Al iu, kiu observas min de ekstere, povas ŝajni, ke mi babilas en tiuj du lingvoj samnivele, mi legas kaj skribas en ili samnivele, do mi scipovas ilin samnivele. Sed fakte al mi estas pli facile uzi Esperanton ol la anglan, kiam eblas elekti. Tio okazas pro tio, ke mi sentas pli da memfido en Esperanto ol

en la angla. Ekzemple, se iu denaska parolanto de la angla korektas unu el miaj esprimoj en angle verkita teksto, mi ne aŭdacas kontraŭdiri lin aŭ ŝin pri la lingvo mem. (Mi ne parolas nun pri stilo aŭ enhavo. Tajperaroj aŭ alispecaj eraroj pro malatento ne rilatas al tiu ĉi diskuto.) Se du amikoj denaske parolantoj de la angla havas malsimilajn opiniojn pri iu frazo uzita de mi en iu teksto, mi solvas la dilemon forigante tiun frazon aŭ... serĉante trian konsilanton. Kutime mi preferas fidi tiun personon, kiu ŝajnas al mi pli klera aŭ pli talenta pri lingvoj.

En la rumana (mia denaska lingvo), tia situacio ne povas okazi. Kompreneble mi dankas tiujn, kiuj proponas al mi plibonigojn de la rumana teksto. Sed mi mem decidas, ĉu iu vere trovis pli taŭgan esprimon por mia penso aŭ sento.

Kiam temas pri Esperanto, mi reagis al korektoj samkiel en la denaska lingvo: mi kapablas kribri la konsilojn de la provlegantoj multe pli bone ol en ajna nendenaska lingvo.

Indas aldoni interesan psikologian fenomenon: Esperanto estas la sola nendenaska lingvo, en kiu mi kelkfoje songâs...

Laste sed tute ne malgrave: malsimile al ajna etna lingvo, por Esperanto oni tute ne devas klopodi imiti la akĉenton de denaskaj parolantoj. Laŭ mi, tio estas granda facilaĵo, kiu multe helpas onin senti sin "hejme" en la Esperante parolanta komunumo.

Kara Luiza!

Vi skribas: „mi persone ŝategas lingvoscipovon”. Tio similas al kolekto en muzeo, al trezoro en banko. Mi dirus pri mi mem: Mi ŝategas lingvouzon, ĉar mi estas babilema.... Se mi uzas lingvon, tio ne eluzas ĝin, ĝi ne malaperas, kiel pantalono eluziĝas, truiĝas kaj finfine finas sian vivon en rubujo. Per uzado de lingvo la parolanto riĉiĝas akirante novajn sciojn.

„...en la komenco mi spertis iuspecan eŭforion pro la rapideco, laŭ kiu la nova lingvo estis eniĝanta mian menson” vi skribas. Jes ja, oni lernas rapide la bazajn regulojn. Se iu lernanto aŭdas, ke la substantivoj ĉiam finiĝas per -o, tion oni ne devas ripeti al li plurfoje. Mi konstatis, ke la lernanto sentas facilecon, dum la lernota lingvo similas al lia denaska lingvo. Poste, kiam la lernanto devas „salti” al novaj strukturoj, tiam venas sento de malfacileco.

„Tio okazas pro tio, ke mi sentas pli da memfido en Esperanto ol en la angla. (...) ...oni tute ne devas klopodi imiti la akĉenton de denaskaj parolantoj.” Vi

tute pravas, kara Luiza. Vi apartenas al la lingvo-komunumo kaj homoj kiel vi konsistigas la normon. En etna lingvo la normo formiĝas ĉe la denaskuloj. Iu lernanto devas klopodi imiti ilin. Niaj denaskuloj estas eta grupo, iliaj gepatroj ofte ne mem estas denaskuloj. Do ili ne povas produkti la normon. La normo kreiĝas okaze de niaj renkontiĝoj, de niaj kongresoj, en nia gazetaro kaj literaturo. La situacio de Esperanto pri tiu aspekto estas tute alia ol por la etnaj lingvoj.

Strange, ke mi foje sonĝas en la germana aŭ svis-germana, ne nur en la franca, ankaŭ en Esperanto!!

(daŭrigota)

Du ludoj por ŝanĝo de la instru- kaj lernmetodoj

de Klaus SANTOZKI (Germanio)

Dum interesa grupvespero, renkontiĝo aŭ leciono, la organizanto aŭ la partoprenantoj povas prezenti aŭ proponi sociajn ludojn. La ludoj ne estu komputilludoj, sed eble laŭtradiciaj ludoj, eble de la infaneco. Por komputilludoj la partoprenantoj ja havas la ŝancon en sia hejmo. La ludoj povus havi rilaton al lingvoj, speciale al Esperanto.


Laŭ miaj observoj la tradiciaj sociaj ludoj estas pli bonvenaj ol ludoj sur la ekrano. Estus avantaĝe, ke la kunludantoj havu la sciojn de la ludo laŭ sia gepatra lingvo, sed tio ne estas kondiĉo. La gvidanto ĉiam devas helpi dum la enkonduko de la ludo.

Mi proponas ĉi tie kelkajn ekzemplojn, kiujn mi ludis kun miaj amikoj resp. kurspartoprenantoj:

1 - Skrablo

Skrablo (*scrabble*) estas angla ludo. Oni ludas tiun ludon en multaj landoj. Du ĝis kvar kunludantoj okupiĝas laŭ la maniero de krucvorttenigmo.

Ĉiu ludanto ricevas malgrandajn lignajn platojn kun litero, oni diras „tegoletoj”. Por la tegoletoj oni havas starigilon. Ĉiu tegoleto



repzentas valoron laŭ la ofteco de la litero kaj oni povas konstrui vortojn uzante la tegoletojn laŭ la reguloj de la ludo.

Gravaj konsiloj

La detalajn ludregulojn vi trovas sur tiu retpaĝo:

<http://skrablo.ikso.net/regularo.php>

La sekvanta paĝo informas pri la temo: „Skrablo: vortludo populara, tamen iom ĥaosa” <http://bulteno.esperanto-usa.org/2014/2/40-ludoj-skrablo.html>

Ankaŭ *Wikipedia* informas pri tiu ludo en Esperanta lingvo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Skrablo>

Mia edzino alifunkciigis la germanan ludon en la Esperantan version. La distribuadon de la literoj kaj la punktoj ŝi elprenis de la sekvanta retpaĝo: <http://skrablo.ikso.net/regularo.php>

Tiu ludo ne nur estas ludo, sed ankaŭ instru- kaj lernilo. Per ĝia uzo dum la instruado kaj pliklerigado estas multaj celoj atingeblaj.

Skrablo per interreto

Se vi volas ludi „Skrablo” per interreto kontraŭ aliaj esperantistoj, jen la paĝo: <http://skrablo.ikso.net/>

2 – Vorta ludo „fino = komenco”

La unua persono skribas substantivon sen finaĵo „-o” (kun apostrofo) ekzemple **dom’** kaj la dua persono skribas vorton komencantan per la fina litero de la radiko de la unua vorto, en nia ekzemplo temas pri „m”; propono povus esti **motor’**.

La sekvanta sinsekvo povus esti: motor’ – ran’ – nokt’- tem’ – ktp.

Tiu ludo ne postulas grandan investon kaj preparon. Mi rekomendas, ke vi ĉiam ludu mallongan tempon okaze de ĉiu leciono.

La partoprenantoj devas interkonsenti, ĉu oni rajtas uzi vortaron aŭ ne. Por la skribado kaj eventuale por la serĉado en vortaro oni devas precizigi la tempon de ĉiu kunludanto.

Oni povus skribi sur tabulo de la studloko aŭ sur papero. Ĉi tie mi proponas facilan ŝablonon.

<i>nomo</i>	<i>vorto</i>	<i>vorto</i>	<i>vorto</i>	<i>vorto</i>	<i>vorto</i>	<i>vorto</i>
Monika	dom´					
Klaus		motor´				
Olrik			ran´			
Dirk				nokt´		
Pedro					tem´	

Faru kopiŝablonon por la grupa laboro per papero laŭ la sekvanta propono:

Nomo:

Dato:

Tasko:

La unua persono skribas substantivon sen finaĵo „-o” (kun apostrofo) ekzemple „dom´” kaj la dua persono skribas vorton komencantan per la fina litero de la radiko de la unua vorto „m” = „motor´”.

Alia eblo por tiu ludmaniero estas, ke ĉiu partoprenanto ricevas laborfoliojn kun la sekvantaj indikoj.

Unua vorto =

Skribu la sekvantajn vortojn komencantajn per la fina litero de la radiko de la unua vorto.

1.	2.	3.	4	5.	6.
7.	8.	9.	10.	11.	12.
13.	14.	15.	16.	17.	ktp.

Post kelka tempo, ekz. 5 minutoj, la ludanto kalkulas la vortojn kaj kontrolas la ĝustecon. Venkinto estas la persono kun la plej multaj ĝustaj vortoj. Se vi volos ludi sole tiun ludon, sur la internetpaĝo *lernu.net* vi trovos taŭgan eblon en la forumo/lingvaj ludoj/VortLudo.

El la landoj kaj sekcioj...

Albanio

Esperanto kaj abiturientoj

Mi estis preskaŭ 16-jara, kiam mi konatiĝis kun la internacia helplingvo Esperanto. La saman aĝon havis fakte ankaŭ la aŭtoro de la lingvo, Ludoviko Lazaro Zamenhof. Same aĝis ankaŭ liaj samklasanoj, kiuj estis la unuaj

provantoj kaj subtenantoj de la lingvo konstruita per tiom da kreemeco kaj perfekteco.

Tial, mi decidis aranĝi konatigan prelegon kun la studentoj de la gimnazio, kie mi mem studis, tiuj de „Sami Frashëri”

Dum la unuaj jaroj post 1991, ne estis malfacile fari tion ankaŭ en tiu gimnazio, ĉar tiam la albanoj estis „soifantaj por koni la fremdan mondon”, kiu apenaŭ akceptis ilin senvize. Post la tre interesa konversacio farita de nia forpasinta amiko, profesoro pri inĝenierio Vasil PISTOLI, kun du grandaj grupoj el tiu lernejo, la kurson de Esperanto sekvis ĝisfine dudek personoj. Ili akiris ankaŭ la „atestilojn” pri la unua lingvonivelo. Poste, somere 1995, 15 el tiuj kursanoj estis invititaj de Esperantista Junularo de Zagrebo gvidata de fraŭlino Marija BELOŜEVIĆ por pasigi tie dek tagojn; ili vojaĝis per ŝipo, ĝuadis plurajn ekskursojn kaj praktikis la lingvon. Sed septembre ili komencis la universitatajn studojn kaj tiel, disigitaj, forlasis ankaŭ Esperanton.



La samo okazis ankaŭ al centoj da aliaj studentoj, kiuj partoprenis niajn lernokursojn, ankaŭ al 50 el tiuj, kiuj plustudis pri turismo kaj internacia kulturo en privata altlernejo en Pollando, kie oni uzadis kiel laborlingvon ankaŭ Esperanton.

Dum la sekvaj jaroj la pordoj de la lernejoj kaj universitatoj estis preskaŭ fermitaj por nia Esperanto-asocio.

Estis la bonkomprenemo de la gimnaziestrino s-ino Teuta DOBI, mia kolegino pri la matematik-instruado, kiu ebligis la aranĝon de prelego ĝuste antaŭ la abiturientoj de la gimnazio „Sami Frashëri” en Tirana.

Akompanis min s-ro Bedri ALIMEHMETI, ĵurnalisto kaj verkisto, mia eksa samklasano, kiu lastjare eldonis siajn poeziaĵojn en du lingvoj, albane kaj Esperante. Mi parolis al la gelernantoj pri la historio de la internacia lingvo en la mondo kaj en Albanio, pri la strukturo de la lingvo, sin distinganta disde la ceteraj naciaj lingvoj pro siaj facileco, simpleco, logikeco, reguleco, neŭtraleco, klareco, egaleco, propedeŭtikeco por la lernado de la aliaj, naciaj lingvoj.

Konklude, la lernantoj demandis min interalie: kial, posedante tiom da avantaĝoj, Esperanto tamen ne estas tiom multe disvastigita; kiamaniere oni povus lerni ĝin; kiel oni povus membriĝi en la Esperanto-asocio; kion prenis Esperanto el la albana kaj ĝenerale el la ceteraj eŭropaj lingvofamilioj?

Almenaŭ 24 personoj (15 knabinoj kaj 9 knaboj) enskribiĝis, esprimante sian deziron eklerni la lingvon perrete. Tio ege ĝojigis min, esperigante, ke almenaŭ parto el ili kontinuos nian laboron, aparte nuntempe, kiam ni ne estas plu junaj... Eble ili invitos aliajn siajn amikojn al ĉi tiu nova entrepreno!

Bardhyl SELIMI <bselimi@gmail.com>

Benino

Regula instruado de Esperanto en elementa lernejo en Benino⁵

Dum la kursoj ĉiuj lernantoj partoprenas; ĉiuj volas proponi respondon al demando, eĉ se ili ne estas certaj pri la respondo, ili volas feliĉe ion proponi; ili facile divenas, ili ne timas krei kaj proponi laŭ siaj komprenoj; oni ludas lernante Esperanton... Fakte la Esperantohoro estas ĝoja tempo por la gelernantoj. Tiuj, kiuj ankoraŭ ne atingis tiun klason, rigardas nin tra fenestroj, kiam ni faras parolajn ekzercojn. Tio kaptis la atenton de ĉiuj lernejoj de Hadeignon. Do



⁵ Artikolo verkita por la Revuo ESPERANTO. Ni represas ĝin kun la permeso de la aŭtoro kaj la redaktoroj.

okazis, ke la instruistoj de tiu lernejo ankaŭ volas studi Esperanton, kaj tion Kingslim favore kaj ĝoje akceptis kun aprobo de la Prezidanto de SSB.

Ĝis nun la instruado bone disvolviĝas. La instruisto ĉefe uzas laŭ sia kapablo instruilojn kiel kretoj kaj fotokopioj de bildoj kaj de tekstoj. La lernolibro por la instruistoj estas *Metodo 11*, sed la kursoj por la gelernantoj estas bazita sur la lernolibro *‘L’Espéranto par la Méthode Directe’* de Stano MARČEK.

Ĉio bone okazas en ‘Hadegnon’, vorto el „adja-gbe”, la loka lingvo „adja”, kiu signifas, „*ni daŭrigu bonan amikecon*”, laŭ la klarigo de la Direktoro. Konsekvence, SSB esperas daŭrigi amikecon kun tiu lernejo danke al la instruado de Esperanto.

Kingslim Gadoufia EDAH

Finnlando

Inter la 15-a kaj 18-a de junio okazos somera kurso en Rauma, Finnlando. Instruistino estos Magdalena FEIFIČOVÁ (Fejfi). Pliaj informoj aperas ĉe edukado.net inter movadaj kursoj.

Informis: Sylvia HÄMÄLÄINEN

Germanio

Franz-Georg RÖSSLER (1949-2017)

Mi ekkonis Franciskon (aŭ kiel li kelkfoje nomis sin hungare „Ferenc”) antaŭ 25 jaroj. En 1992 li kun sia edzino Rita instruis en la ILEI-Gimnazio kadre de la 26-a Konferenco en Bratislavo. Ĝin partoprenis ankaŭ mia lernantino, kiu en la antaŭa lernojaro gajnis la unuan lokon en la tutlanda konkurso pri Esperanto, tiel gajninte la rajton senpage partopreni la some-ran kursaron.



Post la kursaro la geedzoj Rössler venis al Hungario la unuan fojon por viziti tiun lernantinon kaj ŝi akompanis ilin al mi. La lando tiom ekplaĉis al ili, ke poste ili komencis lerni la hungaran lingvon, akiris amikojn kaj preskaŭ ĉiujare ili revenis.

En mia urbeto ili havis plurajn ekspoziciojn en la urba biblioteko, en la loka kulturcentro kaj en la kalvinana gimnazio: ili prezentis siajn artaĵojn, donis koncertetojn. Ili eĉ eldonis librojn en mia urbo, en unu el la libroj li rakontas pri la hungaraj vojaĝimpresoj en tri lingvoj (en la tradukado ankaŭ mi kunlaboris).

Franz-Georg estis modesta homo, li ne ŝatis fieradi. Lian artverkon ankaŭ mi nur parte konis. Li ne tre ŝatis interreton, sed estas tre bonvene, ke oni aperigis bonan resumon pri lia kompleta vivoferko en Vikipedio: https://eo.wikipedia.org/wiki/Franz-Georg_R%C3%B6ssler.

Kiam li pensiuliĝis, mi petis, ke li – kiel iama redakciano de IPR – verku artikolon por niaj legantoj. Lia artikolo aperis en IPR 2013/1. (p.20-22) kun titolo *Iam instruisto – ĉiam instruisto*.

Post la UK en Nitro (SK) ili vizitis min la lastan fojon en aŭgusto 2016. Mi montris al ili mian novan aŭton kaj ni kune aŭskultis klasikan muzikon kunlige kun luda kvizo. Nia lasta leterinterŝanĝo estis kristnaske de 2016. Mi plendis, ke mi ekhavis dorsoproblemojn (parte pro la redakta laboro). Li konsolis min jene: „Niaj problemoj ne estas pli malgrandaj ol la viaj. Rita iras al ĉiuj kuracistoj, mi provas eviti diagnozojn.” Kaj li aldonis hungare: „*Amíg élünk, remélünk.*” (Dum ni spiras, ni esperas).

La 18-an de marto 2017 mi sendis al li mesaĝon pri la (feliĉe provizora) pliiĝo de miaj doloroj. Li ne povis respondi, ĉar unu tagon pli frue li forlasis nin. *Kara Ferenc, ripozu en paco!*

József NÉMETH

La jarĉefkunveno de AGEI

La jarĉefkunveno de AGEI estos la 3-an de junio 2017, en sabato je la 15-a horo dum la 94-a Germana Esperanto-Kongreso en Freiburg im Breisgau, kiu okazos inter 2-5.06.2017. El la programo: jarraporto, trarigardo de Esperanto-instruado en Germanio, vojoj al instrukapabligo, klerigado kaj pluklerigado, studprogramoj, stipendioj kaj internaciaj rilatoj.

Krom membroj ankaŭ vizitantoj, interesiĝantoj estas bonvenaj.

Informis: Zsófia KÓRÓDY

Italio

En la bazlernejo de Verdello (Bergamo) estas okazanta kurso pri Esperanto

Ekde 2011 Maria GALIZZI aktivigas kurson de Esperanto por la infanoj de la elementa lernejo 'Istituto Comprensivo' de Verdello (Bergamo) kunlabore kun Felice SOROSINA. En junio 2016 oni finis la kvinjaran kurson, kaj dudek unu geknaboj eltenis, sukcese, la unuagradan Esperantan ekzamenon laŭ la postuloj de la Itala Instituto de Esperanto.

Krome, la lernejo, tre kontentige, ricevis la viziton de la esperantistino Kimie MARKARIAN, japanino el Londono, kiu instruis al tri klasoj la uzadon de la japana kalkulilo 'sorobano'.

Sekve de la sukceso de la iniciato la lernejestro invitis Maria-n daŭrigi la instruadon de Esperanto ankaŭ en la loka mezlernejo.



S-rino Kimie MARKARIAN instruas la uzon de la kalkulilo. Felice SOROSINO kaj mi helpas al ŝi.



Jen vigla lernanto, kiu montras per Sorobano la numeron indikitan de Kimie.



Lernantoj kaj gepatroj en la klasĉambro dum la leciono de Sorobano.

Maria GALIZZI, Istituto Comprensivo, via Mazzini 14, 24049 Verdellino (BG), Italio. Retadreso: m.galizzi@alice.it

Pollando

Aliĝu al la nova grupo de la unikaj Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj festu kune ilian 20-jariĝon kadre de la 4a Interlingvistika Simpozio!

Nur ĉiun trian jaron komencas siajn studojn nova grupo ĉe la Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, la sekva eblo estos en septembro por la periodo 2017-20. Unu el la plej prestiĝaj universitatoj en Pollando, ofertas programon, unikan en la tuta mondo: 3-jarajn eksterajn postdiplomajn studojn pri interlingvistiko kaj esperantologio, tute en EO.



La speciala programo estis aprobita antaŭ 20 jaroj kaj la unua grupo komencis siajn studojn en 1998, la sesa grupo finos siajn studojn ĉi-septembre. La festo okazos dum la 4a Interlingvistika Simpozio (21-22.09), tuj post la interlingvistika sesio kaj antaŭ la tradicia kultura festivalo Arkones (informoj en la retejo de la Studoj).

La internacia kursaro okazas en la Lingvistika Instituto de UAM, sub la gvido de la fondinto, prof. Ilona Koutny. Ŝi dediĉis 30 jarojn de universitata kariero al la instruado de esperantologio. En la budapeŝta Eötvös Universitato (ELTE) ŝi plenumis tion kiel ĉefan taskon en la Esperanto-fako, kiun fondis d-ro István Szerdahelyi en 1966 kaj ŝi transprenis ĝin post lia morto en 1987. En 1991 ŝi kun kolegino d-rino Zsuzsa Varga-Haszonits fondis la unuajn internaciajn esperantologiajn studojn (Koutny 2016*). Poste en UAM ŝia agado dividiĝas inter la hungara fako kaj la interlingvistika.

Inter la prelegantoj de la Interlingvistikaj Studoj ĉiam estis kaj estas elstaraj esperantologoj, kiel profesoroj Vera Barandovská-Frank, Vilmos Benczik, Duncan Charters, Renato Corsetti, Probal Dasgupta, Nicolau Dols Salas, Sabine Fiedler, Zbigniew Galor, Aleksander Melnikov, Humphrey Tonkin kaj John Wells; doktoroj Detlev Blanke, Katalin Kováts, Ulrich Lins kaj

Blazio Wacha; la poetino Lidia Ligeza, fakuloj de sia tereno kiel Michel Duc Goninaz, Tomasz Chmielik, István Ertl, Michael Farris, Aleksander Korjenkov, Maria Majerczak, Ziko van Dijk kaj Zsófia Kóródy.

La Interlingvistikaj Studoj donas superrigardon pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko por havi bazon por la studado de la lingvistikaj aspektoj de Esperanto, fokusiĝas al internacia kaj interkultura komunikado, traktas planlingvojn kaj detale okupiĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de Esperanto. En la tria jaro eblas specialiĝi pri komunikado, lingvistiko, literaturo, tradukado, planlingvistiko aŭ pri lingvopedagogio. Pro la metodika formado la Studoj ricevas specialan rolon en la instruista trejnado. Ekde la studjaro 2007/08 realiĝas kunlaboro kun ILEI, kaj ĉiun trian jaron eblas aparte aliĝi al tiu ĉi specialiĝo. En la metodika kursaro IS kunlaboras ankaŭ kun Edukado.net.

Unusemajnaj intensaj sesioj (surlokaj kursoj de po 4 studobjektoj kaj ekzamenoj) okazas unufoje dum la semestro (fine de septembro kaj komence de februaro), intertempe la gestudentoj laboras pri siaj taskoj hejme kaj rete, ili konsultiĝas rete kun la prelegantoj. La gestudentoj pretigas diplomlaboraĵon kaj post la fina ekzameno ricevos atestilon de UAM pri la plenumo de Interlingvistikaj Studoj.

Partoprenontoj povas aliĝi el la tuta mondo por la studjaroj 2017/2020 ĝis la 15-a de aŭgusto 2017. Pli frua anonco estas bonvena. La unua sesio okazos inter la 16-22.09.2017. Postuloj: baza diplomo pri supergradaj studoj kaj bona scio de Esperanto. Partoprenontoj devas plenumi orientiĝan teston antaŭ la komenco de la Studoj komence de la unua sesio.

Kotizo por unu semestro: 1850 PLN (ĉ. 460 EUR), reduktita 700 PLN (ĉirkaŭ 175 EUR) por B-landoj. Kelkaj stipendioj (por la studkotizo) estas antaŭvidataj dank' al ESF (Esperantic Studies Foundation).

Por pluaj informoj kaj aliĝilo: <http://www.amu.edu.pl/~inter/>, kontakto: interlin@amu.edu.pl aŭ Prof. dr hab. Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj Lingvistika Instituto de Universitato Adam Mickiewicz, al. Niepodległości 4, PL-61-874 Poznań, ikoutny@amu.edu.pl

* KOUTNY Ilona 2016: Esperantologio kaj formado de Esperanto-instruistoj en universitato. En: *Prelegaro de la Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado do Esperanto*. Red. GROSJEAN, Mireille. ILEI 26-33.

Korekto

En IPR 2017/1 aperis recenzo pri la libro *Helplibro por instruistoj* de Tatjana AUDERSKAYA (p.34-35). Ŝi loĝas en Ukrainio kaj ne en Rusio. Pardonu pro la redaktora eraro!

La 51-a Kongreso de ILEI – Madrido 2018

La kultura heredaĵo de Esperanto

En la jaro 2018 ILEI kongresos en Madrido, 21-28 julio, en la semajno antaŭ la UK en Lisbono. La kongreso okazos en la universitata rezidejo (<http://www.alojamientomadridverano.com/es>), kie jam kongresis SAT en la jaro 2013. La hispanaj kolegoj, koresponde kun la Estraro de ILEI, enketis pri diversaj lokoj en Hispanio kiel eblaj okazejoj de ILEI-kongreso. La madrida solvo montriĝis la plej taŭga, inkluzive de facila transiro al la UK.

Pasintjare la Eŭropa Komisiono proponis la jaron 2018 Eŭropa jaro de kultura heredaĵo. ILEI kiel tutmonda organizo subtenas kaj mondkalajn kaj specifajn regionajn aŭ kontinentajn projektojn por lingva justeco kaj konservado de la kultura heredaĵo en ĉiuj mondopartoj, do ankaŭ en Eŭropo. Tial la Eŭropa jaro de kultura heredaĵo inspiras al ni la titolon de ĉi tiu komuniko kiel kongresan ĉeftemon kun jenaj kaj ne nur tiuj subtemoj, kiuj permesas la traktadon kaj en la eŭropa lumo kaj en la mondkala perspektivo kaj el vidpunkto de specifaj intereso de Esperanto-komunumo:

- Reflektoj de naciaj kulturoj en la kulturo de Esperanto
- Kontribuo de Esperanto al la Eŭropa kultura heredaĵo
- Esperanto kiel ero de kultura heredaĵo de la homaro
- Pedagogiaj valoroj de Esperanto-kulturo
- La kulturo de Esperanto kiel instru-temo kaj instru-helpilo.

Radojica PETROVIĆ, Estrarano pri kongresoj de ILEI
Mireille GROSJEAN, Prezidanto de ILEI

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Christophe Chazarein, Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Rob Moerbeek.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: M. Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Goro Kimura, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat. Estrare: Gong Xiaofeng „Arko”, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Viťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnseioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsofia.korody@esperanto.de.

IFEF (Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio): *vd. la Jarlibron de UEA*

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Arina Osipova**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Stefan MacGill**.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leyster Miro**.

Unesko (kun statuso de observanto): Rezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr, **Jean-Pierre Boulet, Pascale Voldoire**.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. **Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj.** Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Presado:** Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro:** NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, jozefo.nemeth@gmail.com, www.ilei.info/ipr/; tel: (+36-70) 931-0530. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, <moerbeekr@gmail.com>.

**Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aprilo 2017,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aŭgusto 2017.**



Instruado de Esperanto en elementa lernejo en Benino (vd. p.10)



